# KIVA: Kiel elspezi la saman monon multfoje, kaj helpi aliajn

## JOANNE JOHNS (MELBURNO)

Inter la multnombraj subgrupoj de Esperantujo, estas unu ĉe la retejo Kiva, kun la celo elspezi monon nome de nia kara lingvo. Sed por kio? Kaj kial?

Laŭ Kiva, estas pli ol miliardo da homoj ĉirkaŭ la mondo, kiuj ne havas bankkonton. Tio estas miliardo da homoj, kiuj ne havas kreditkarton kaze de krizoj, debitkarton por facila alireblo al sia mono, aŭ kredithistorion por helpi ilin ricevi prunton.

Kiva estas internacia neprofitcela organizo, kiu celas helpi tiujn homojn. Per konektado al homoj tra amasfinancitaj mikropruntoj, Kiva metas la potencon de financa inkluziveco en ĉiuj niaj manoj.

Ĝi komenciĝis en marto 2005, per vivŝanĝa $500 prunto al uganda virino, por helpi al ŝi pligrandigi sian fiŝvendadan komercon. Nun pli ol 5 milionoj da homoj uzis Kiva-pruntojn por ŝanĝi siajn vivojn.



*Esperantistinoj en kurda regiono de Irano*

**Kiel ĝi funkcias?**

- Iu petas mikroprunton, ekz. $1000.
- Prunta partnero afiŝas la peton ĉe Kiva.
- Vi elektas personon, kaj pruntedonas $25 (aŭ pli!) por helpi amasfinanci la tutan sumon.
- Kiam sufiĉe da homoj pruntedonas, la petinto ricevas la monon per la prunta partnero.
- Kiam la prunto estas repagata (iom post iom), vi re-ricevas vian monon (iom post iom).[1]
- Kiam vi refoje havas vian unuan sumon, vi povas pruntedoni ĝin al nova petanto.
- Tiel via mono povas esti elspezita

*Daŭras* >

multfoje por helpi multajn homojn!

Mi mem aliĝis al Kiva en 2014, kaj ekde tiam donis la saman $25 al 11 homoj (ĉiuj virinoj, ĉar mi tiel elektis) el Ekvadoro, Salvadoro, Fiĝio, Kartvelio, Kirgizio, Palestino, Filipinoj, kaj Taĝikio. Per tiu mono ili kleriĝis, pligrandigis komercojn per aĉetado de ingrediencoj, ŝtofoj, brutoj, iloj, maŝinoj ktp, aŭ eĉ ricevis kuracadon kontraŭ longdaŭra malsano. Vi ankaŭ povas helpi homojn pri agrikulturo, arto, manĝo, akvo, rifuĝado kaj multaj aliaj temoj.

Se vi emas helpi, ankaŭ indas aliĝi al la Esperanto-grupo en Kiva, por ke ni povu vidi nian komunan efikon.

Laŭ la priskribo de la grupo: Esperantistoj volas konvinki al aliaj, ke Esperanto signifas amon, pacon, kunsentadon kaj aliajn bonajn ecojn. Kiel sukcesus al ni tion fari? Ekzemple per bonfaranta kunlaborado.

La ligilo al la grupo estas: **www.kiva.org/team/esperanto.**

Nunaj statistikoj de la grupo, ekde septembro 2008:

- 39 membroj
- $101 505 donita
- 3 650 pruntoj
- 93.6 pruntoj per membro

---

[1] Fojfoje oni perdas iomete pro valuto-perdo, sed se vi bone atentas la detalojn de la prunto, vi povas facile eviti tion ĉi, ĉar ofte la prunta partnero kovros tiun perdon. E



*Kiva-petanto*